NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 658.709.087
esperantobilbao@terra.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

NOVEMBRO/DECEMBRO 2004 **Nro. 57 (2/04)**



Sabato 20/12/2003. Bilbao. E-Grupejo. Anoj de la E-Grupo de Bilbao celebras la zamenhofan festotagon pasintjare. Ĉi-jare ni kalkulas ankaŭ je via ĉeesto. ***Vidu sur paĝo 2.***

ZAMENHOFA "FESTOTAGO".

La 15an de decembro estos la 145a datreveno de la naskiĝo de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kreinto de Esperanto, en la pola urba Bialistoko.

Okaze de tio, same kiel okazas en diversaj E-kluboj tra la tuta mondo, ni kuniĝos en nia sidejo por fari modestan celebron kaj profitos la okazon por kune adiaŭi la jaron, saluti malnovajn konatulojn, ...

Ĉi jare ni kolektiĝos la **vendredon 17an de decembro**, je la **19,30 h**. Kiel kutime, al spektado de mallonga videofilmo sekvos debato kaj, plej interese, babilado ĉirkaŭ tablo plenplena de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj.

"FIESTA" DE ZAMENHOF.


Como ya es tradicional, para celebrar el aniversario del nacimiento del creador del Esperanto, el próximo **viernes 17 de Diciembre**, a las **19,30 h.**, nos reuniremos en la sede del grupo.

En realidad, no deja de ser una excusa para despedir juntos el año, reencontrarse con viejos conocidos, etc.

Después de ver un corto vídeo, tendremos un pequeño debate y, para acabar, charlaremos tranquilamente alrededor de una mesa, llena de los manjares que aporten los asistentes.

LOTERÍA DE NAVIDAD.

Ya a punto de agotarse, os recordamos que **no se reserva lotería de Navidad**, por lo que debéis comprarla cuanto antes. Las papeletas, totalmente escritas en Esperanto, se venden a 3,00 euros cada una (se juegan 2,50 euros; los 0,50 euros restantes quedan como donativo para nuestro Grupo).



NOVAJ ESPERANTO-KURSOJ.

Meze de oktobro komencis 2 novaj E-kursoj, danke al sindonemo de du el niaj asocianoj:

Ĉiu vendredo, inter la 7-a kaj 8,30-a horoj, nia juna amiko **Patxi de la Hoz** gvidas elementan kurson, kiun partoprenas sep gelernantoj. Ekde la komenco ili montris grandan intereson pri Esperanto kaj, supozeble, baldaŭ ili eniros la mondon de la Esperanto-parolantoj.

Kaj la merkredoj, nia veterana kaj nelacigebla amiko **Eduardo Larrouy** gvidas paroligan kurson, kiu laŭ liaj propaj vortoj, pli estas "amika kunsido" ol kurso. La kunvenon ĉeestas 5 geamikoj, kelkaj el ili malnovaj grupanoj kiuj, iam, perdis la kontakton kun ni kaj nun emas reveni.

Kompreneble, ni invitas vin ĉiujn partopreni la kursojn kaj interkonatiĝi kun la novbakitaj geesperantistoj.

ESPERANTISTOJ EL BILBAO TRAKURAS LA MONDON ...



Du esperantistoj el Bilbao pozas, ene de preĝejo, dum Esperanta bapta ceremonio, en la pola urbo Malbork, apud la fama pola esperantisto Eduardo Kozyra. Ili partoprenis tie Seminarion pri turismo.

NIA E-GRUPO EN LA AMASKOMUNIKILOJ

Ĵ-23-09-2004. Duonhora intervjuo en Euskal Telebista (ETB), la vaska publika televidĉeno, al nia Prezidanto, J. Miguel García Iturrioz, fare de la fama ĵurnalisto David Barbero. Temis pri kultura programo titolita "Forum" kaj la prezento de nis lingvo estis vere alloga, kun enŝovigo de videofilmoj, fotoj, lernolibraj lumbildoj, k.t.p. Esperanto estis traktata kiel kultura fenomeno kaj la plejparto de la demandoj temis pri la strukturo de la lingvo, vortdeveno, gramatiko, ...
La programon oni dissendis, dufoje, la 14an de oktobro.

V-22-10-2004. Dekminuta intervjuo al J. Miguel García en "Punto Radio", la nova radistacio de la nacia "Grupo Correo". La ĉefa celo estis la diskonigo inter la aŭskultantoj de la E-kursoj organizitaj de nia E-klubo.

V-26-11-2004 Partopreno de J. Miguel García en 1-hora programo post alvoko de la loka televidĉeno "Canal Euskadi". En la programo partoprenis aliaj parolantoj de "ekzotikaj" lingvoj kaj oni parolis pri la sperto de ni ĉiuj rilate niajn respektivajn lingvojn.

KONTAKTOJ KUN INSTITUCIOJ.

La mardon 16-11-2004, Eduardo Larrouy kaj J. Miguel García rendevuis kun Txema Oleaga, voĉtenanto de la socialisma grupo en la Magistrato de Bilbao. La renkontiĝo okazis danke al pledado de Toño del Barrio, kiu prelegis en aŭgusto, dum la EEU-kongreso, pri Juan Gracia, eksprezidanto de la E-Grupo de Bilbao kaj konsilanto de la unua vaska registaro, dum la hispana intercivitana milito (1936/39). Toño petis informojn al socialisma grupo kaj ili telefonis al ni. Toño del Barrio estas la nuna Prezidanto de SATEH (SAT en Hispanio) kaj de Fundación Esperanto.

La interparolado estis ege afabla kaj kleriga; Txema Oleaga montris grandan intereson pri Juan Gracia kaj pri Esperanto. Rezulto de la parolado estis:

1. Li petos ke la monata ĵurnalo "Bilbao" aperigu, en ĉiu numero, informojn pri aŭ en Esperanto, liveritaj de ni.

2. Li petos ke "Juan Gracia" estu la nomo de nova strato de Bilbao.

La finan parton de la rendevuo ankaŭ partoprenis, kaj salutis nin, Begoña Gil, edzino de Patxi López, ĉefresponsulo de la vaskaj socialistoj.

NOVA DISSENDOLISTO "ESPERANTO-EN-EUSKIO".

Ĉi tiu letero estas por anonci al vi la kreadon de disenlisto nomigita "Esperanto-en-Euskio". Mia celo estas kunigi ĉiujn eŭskajn esperantistojn kun retadreso, por interŝanĝi ideojn, novaĵojn, eventualajn vizitojn de eksterlandaj esperantistoj, kunmanĝadojn, ktp.

Ekzemple, la lastan semajnon aperis en la ĵurnalo "Berria" eta anonco de prelego pri Esperanto en Iruñea.

Mi atentigas pri tio, ke vi devas aliĝi al tiu listo kaj petas ke vi diskonigu al aliaj eŭskaj esperantistoj la ekziston de virtuala loko por paroli inter ni.

Mi inkluzivas la du adresojn de la dissendolisto:

http://groups.yahoo.com/group/Euskio (adreso de la retejo)

Euskio@yahoogroups.com (adreso por sendi mesaĝojn; tamen, vi devas unue aliĝi al la listo).

(Sendita de Javi López, pere de Natxo Apaolaza)

PREZENTADO DE E-LIBRO EN VITORIA.

Kiel vi eble jam scias, Eüska E-Asocio kunlaboris kun Fundación Esperanto, por eldoni, ene de la serio Hispana Literatuto, subvenciite de la "Labora Ŝparkaso", libron kun rakontoj de Pio Baroĥa, tradukitaj de bilbaoa samideano, **Joxemari Sarasua**; titolo de la libro estas tiu de la unua rakonto: "Suzana kaj la muŝĉasisto".

Ni intencas prezenti ĉi libron en Vitorio, la 9an de decembro, ĵaŭde, ĝuste post la "konstitucia ponto", je la 12a aŭ 12a kaj duono en la Infaninstruista Lernejo ("Escuela de Magisterio").

En la prezento parolos Natxo Apaolaza, Prezidanto de Eüska E- Asocio kaj Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek), respondeculo de la serio Hispana Literaturo. Ni kore invitas vin ĉeesti.

(Sendita de Natxo Apaolaza. Vitoria)

LA ESPERANTO-GRUPO DE BILBAO DEZIRAS AL VI ĈIUJ KIEL EBLE PLEJ DA SUKCESO DUM LA VENONTA JARO 2005

LEGITA EN LA ĴURNALOJ.

15 sep. **Borrell ve problemas en una UE plurilingüe.**

El Presidente del parlamento Europeo, Josep Borrell, abogó por una Eurocámara multilingüe, pero subrayó también los problemas logísticos y presupuestarios a los que se enfrenta. Actualmente, el régimen lingüístico se lleva un tercio del gasto de funcionamiento del Parlamento, unos dos millones de euros por día de trabajo.

22 sep. **El presidente del Parlamento Europeo, Josep Borrell, abrirá un debate en la eurocámara sobre la aplicación del régimen lingüístico.**

(..) llevará a la mesa de la institución, que reúne a los 14 vicepresidentes, una propuesta para especificar cómo se aplica el Reglamento sobre el régimen lingüístico, en especial, después de que varios eurodiputados hayan mostrado su interés de intervenir en catalán.

28 sep. **Borrell propondrá que la Eurocámara acepte el euskera, pero sin traducción. Garantizar el multilingüismo absorbe el 38% del presupuesto anual del Parlamento de Estrasburgo.**

El Presidente del parlamento Europeo, José Borrell, propondrá al buró político de la Eurocámara que se permita, a los eurodiputados españoles que lo deseen, intervenir en catalán, euskera o gallego, aunque el actual reglamento les impida, en ese caso, beneficiarse del derecho a una traducción de sus palabras.
(...) Borrell subrayó, así mismo, que casi el 38% del presupuesto anual del parlamento europeo se destina a financiar el coste del actual sistema de multilingüismo, lo que supone un gasto de 2,2 millones de euros por día de trabajo.

Alia pola eŭroparlamentano estas esperantisto!!!

Al la nomo de Margareta Handzlik, pola eŭroparlamentanino kaj esperantistino, oni devas aldoni tiun de alia polo, Bronislaw Geremek. Pasintan sabaton, la 18-an de septembro 2004, Pola Radio, en sia programo 'Esperanto ekspreso', dissendis tradukon de intervjuo de Radio Bielsko al prof. Geremek, nuntempe pola eŭroparlamentano. Li deklaris al Radio Bielsko ke estus dezirinde ke en Europa Unio 'oni ne parolu unuavice anglalingve, sed en Esperanto', kaj aldiris ke antaŭ multaj jaroj li lernis la Internacian Lingvon. Legu plu ĉe Ĝangalo: http://gxangalo.com/esperanto/20.html

Raportis: Pablo Leon <lop@dycasa.com.ar>

(Prenita el retinformejo "NUN")

VOLAPÜK 125-JARA

La Hejmlanda kaj Kultura Asocio de Oberlauda okazigos fest-vesperon pri Volapük kaj Schleyer sabaton, 2004-10-30, en la Urbodoma Salono de Lauda-Königshofen.

Prelegos Reinhard Haupenthal pri la temo '125 jarojn Volapük. Vivo kaj verkaro de Johann Martin Schleyer'. Muzikan kadron donos la preĝeja koruso de Oberlauda, kiu kantos la Volapük-himnon kaj la loka blov-orkestro. En la fino de la fest-vespero inaŭgurigos ekspozicio pri Volapük kaj Schleyer kiu videblos en la urbo-doma salono ĝis inkluzive 2004-11-01. Dimanĉon matene, 10 h, okazos memor-meso por Schleyer en la preĝejo Oberlauda.

Raportis: Reinhard HAUPENTHAL Ae599742@aol.com

(Prenita el retinformejo "NUN")

OpenOffice.org en Esperanto - ekde nun oficiale!

La estraro de la grandioza reta projekto OpenOffice.org (kreanta liberan oficejan programaron alternativan al Microsoft Office) ĵus oficiale akceptis la projekton pri esperantigo de la programaro. En la retejo OpenOffice.org aperis subdomajno http://eo.openoffice.org/ kaj la sciigo pri la Esperanta versio legeblas sur la ĉefa paĝo de la projekto (en la parto 'Pliaj naciaj lingvoj':). La Esperanto-versio estas preparata de la internacia teamo, gvidata de Joey STANFORD kaj Tim MORLEY, ĝi estas ĝis nun la sola reta projekto rekte aŭspiciata de UEA.

Raportis: Andrej Grigorjevskij <andreo@mailru.com>

(Prenita el retinformejo "NUN")

Esperanto-organizo naskiĝis en Afganio

En la 23a de septembro nova Esperanto-organizo naskiĝis en Afganio.

1. Nomo: AAAdEM (Afgana Amika Asocio de Esperanto-Movado).
2. Estraro:
   provizora prezidanto : s-ro Kampo (ĝis la unua Afgana esperanto-renkontiĝo).
   Afgana reprezentanto : S-ro Muĝtaba Mousavi (fakultato:agrikulturo)
   vic-reprezentanto: S-ro Seid Ahmad Shakib Mousavi (fakultato:belartoj)
   vic-reprezentanto: S-ro Mohamad Mahdi Zafari (fakultato:belartoj)
3. Celo: Amikeco per Esperanto
4. Loko: Kabul universitato
5. Esperanto kurso: "Esplernado" per komputilo KD-ROM
   konversacio " Cxu vi parolas esperante ? " KD-ROM
6. Aliaj aferoj:
   konkreta celo : Partopreno de Universala Kongreso en Jokohama Japanio 2007
   Fratorganizo : JAAdEM (japana amika asocio de esperanto magio ktp)

(Raportis: Miguel Gutiérrez Adúriz. Kantabrio).

REKLAMO PRI ESPERANTO EN "LE MONDE".

En la dimanĉa eldono de la franca plej grava ĵurnalo "Le Monde" aperis, en ties 8a paĝo, tutpaĝa anonco pri Esperanto, kun la titolo: "Parlez vous européen?" (Ĉu vi parolas la eŭropan?). La ega anonco estis denove pagita de la japana malavara mecenato Etsuo Miyoshi.

Jen informo de Aleks, transskribita de Henri Masson:

La tutpaĝa anonco ja finfine aperis en Le Monde la dimanĉon, 26-an/09, paĝon 8. Bela paĝo, titolita "Parlez-vous européen ?", titolo laŭ mi pli trafa ol la pasinta "L'égalité des langues : une nécessité pour l'Europe" (egaleco de la lingvoj : necesaĵo por Eŭropo).

Ĝi entute unuavide plaĉas al mi pli ol la pasinta, aperinta je la 14-a de junio 2003. Plaĉas ekzemple, ke ĝi rekte alfrontas la hegemoniecon de la angla ĉe Eŭropa Unio, kaj proponas Esperanton kiel solvon. (Sed fakte kiam oni legas la enhavon, ŝajnas, ke ĝi tre similas al la pasinta... espereble la legantoj ne gardas la arkivojn por kompari...).
Bedaŭrindegas, ke estas eraroj en ĝi :
- La retejo por lerni Esperanton estas www.lernu.net kaj ne www.lernu.com !! : Feliĉe tiu plusendas al ĝusta adreso.
- Oni ankaŭ povas tre bedaŭri, ke anonco celante la francojn ne reklamas la francan retkurson, sed la internacian, 24-lingvan, super kiu la francoj ĝis nun ne havas tutan kontrolon, (afero solvinda).

(Raportis: Darío Rodríguez. Madrido)

RAPORTO PRI LA EEU-KONGRESO EN LA REVUO "ESPERANTO" DE UEA.

Inter la 25-a kaj 30-a de aŭgusto okazis en Bilbao (Eŭskio, Hispanio) la 6-a kongreso de Rŭropa E-Unio. Dum la kongreso, kiun partoprenis 300 esperantistoj el 24 landoj, estis akceptita nova statuto de EEU, post kies registriĝo en Bruselo povos aliĝi novaj landoj de EU. Estis akceptita la invito de la maribora urbestro Boris Sovic, ke la sekva kongreso okazu aŭguste 2007 en Maribor, Slovenio. En la inaŭguro festprelegis s-ro. M. Cwik el Belgio pri la temo "Eŭropa Unuiĝo: Esperanto por multlingva mondo". Aliaj prelegoj temis pri "Historio de la eŭska laborista movado" (A. Del Barrio), "Vidpunktoj pri Eŭropa Unio el neunia eŭropa lando" (A. Nikolaeva); "juraj aspektoj pri la pligrandigo de la Eŭropa Unio" (R. Urueña); "Kian Eŭropon ni volas aŭ bezonas?" (Cwik) kaj "Eŭropa identeco malllonge" (Tisljar). La komitato elektis novan Sekretarion- Zlatko Tisljar. La rezolucio de Bilbao invitas la EU-parlamentanojn stabli interpartian grupon pri lingva egalrajteco. Krom la prelegoj okazis interesaj kulturaj programoj kaj ekskursoj.

(El revuo "Esperanto". N-ro. 1174 (10). Oktobro 2004).